What of the future? Can Esperantists learn anything from Klingon? All I can do as someone who is both an Esperantist and Klingonist is shake my head and smile. My advice is to try to get Paramount Studios to try to find a planet where Esperanto is spoken and to portray

these Esperanto-speaking space aliens in a way that will make them at least as appealing as the Romulans or the Klingons. The idealism of Zamenhof's vision seems to be passé and science fiction is in.

[Editor's note: Going by the press, Klingon's present is bright. Its future may be less so. Star Trek: The Next Generation, with its popular Klingon Lieutenant Worf, is going off the air at the end of this season, and although Worf will likely be back in theatrical-release movies, those will appear at the rate of only one every two or three years. Klingons are only an occasional presence in Star Trek: Deep Space Nine, and though there are reports

of one half-Klingon character in the new Star Trek: Voyagers series, that will have no contact with the Klingon Empire, taking place halfway across the galaxy. So, question: will the Klingon language keep going on its own momentum, or will it fade with the characters who have given it impetus? Or—conceivably—will Paramount decide that there is so much commercial value in the Klingon language that they continue to push it by restoring a Klingon presence to the small tube? Time will tell. Meanwhile, you can find out more about Klingon language camps from Mr. Proechel at: P.O. Box 281, Red Lake Falls MN 56750, tel. (218) 253-4149.]

ESPERANTO AND KLINGON COMPARED

	<u>Klingon</u>	<u>Esperanto</u>
Parts of speech	Unmarked	Determined by endings: -a, -e, -i, -o
Verb tenses	None. Klingon has perfective and imperfective aspect. Endings -pa' or -ta' indicate perfective.	Marked by endings: -as, -is, -os, -us, -u
Word order	Rigid. Object-verb-subject.	Flexible
Homonyms	Many. e.g. ta' ta'ta' ta': The emperor accomplished the deed.	Few
Cognates	Almost none. Human, tera': human, earth	Many
Sounds	Many unusual sounds for English speakers.	Almost all common sounds
Person	Complicated system of prefixes, e.g. jl = I, vl = I plus object qa- = I-you	Personal pronouns mi, vi, li, etc.
Sample phrases	tlhIngan Hol ghochu' nuv val. qmuSHa'	Inteligenta persono lernas Esperanton facile. Mi amas vin.

ESPERANTO: POLITIKA BATALO

de Giorgio Pagano

[La jenan artikolon ni ricevis por aperigo de la Transnacia Radikala Partio, el ties ĉefejo en Romo, Italio. ELNA ne estas politika organizo, kaj ĝi rajtas nek subteni nek kontraŭi la pli multajn celojn de TRP; sed kun unu celo de la organizo, certe preskaŭ ĉiu esperantisto konsentos. Interesitoj povos kontakti TRP-on ĉe adreso trovebla inter la Anoncoj.]

En la tuta mondo pli kaj pli intensiĝas la "lokaj" militoj sur etnaj aŭ religiaj bazoj; ŝanĝiĝas la politikaj kaj militistaj ekvilibroj; Eŭropo, sed ankaŭ UNO, estas senpovaj, ĉesigi tiajn krueleĝaĵojn, kiajn oni opiniis jam nepenseblaj; sur Eŭropo tre forte premadas homamasoj serĉantaj eblecon de pluvivado kaj tia premado fine estigos eksplodajn kondiĉojn en la tuta okcidenta mondo. Ĉio ĉi hodiaŭ, pli ol iam ajn antaŭe, elstarigas la neceson, redefini la regulojn de la tutplaneda kunvivado kaj la personajn rajtojn, kaj trudas tutmondan restrukturadon, kiu transiru etnajn kaj naciajn dividojn en vere ekologia superrigardo. La Radikala Partio formiĝis

sur la konscio pri tio, ke hodiaŭ ne ekzistas naciaj elektoj povantaj vere konsistigi solvon. Jam en 1979 la tiama RP, ankoraŭ ne transnacia kaj transparenta, alfrontis la dramatan situacion de la malsato en la mondo kiel politikan problemon ŝarĝitan de elsekvoj ne nur por la malriĉaj landoj, sed ankaŭ por la riĉaj. Nun tio estas realaĵo aperanta sub ĉies okuloj.

Se hodiaŭ ĉio moviĝas je tutplaneda nivelo, tiam estas neeviteble utiligi netan internacian lingvon, kiu garantiu interkomunikadon de ĉiuj kun ĉiuj.

La internacia lingvo Esperanto ne plimultigas la diskriminaciojn, vere favoras justan distribuadon de la homaj rimedoj, estas vehiklo de demokratio kaj ne estigas, kontraŭe, novajn tavolojn da "eksterlasitoj"; tial ĝi hodiaŭ konsistigas politikan solvon tre pli realisman ol la angla lingvo.

La Radikala Partio transnacia opinias, ke sen lingva demokratio ne eblas realigi iun ajn politikan demokration, kaj do ĝi vidas Esperanton kiel celon strikte ligitan

al la propra kialo ekzisti kaj esti transnacia. Tio ĉi estas la elekto, kiun la RP transnacia oficiale faris en sia kongreso de februaro 1993, sed pri kiu oni jam de antaŭ kelkaj jaroj laboras ĉe la Eŭropa Parlamento kaj ĉe tiuj naciaj parlamentoj, en kiuj ĉestas anoj de RP.

La tempo premas al la punkto de nereveno; la problemon pri la lingva demokratio oni devas urĝe porti sub la atenton de la publika opinio, oni ne plu rajtas simple susuri ĝin inter specialistoj, fakuloj, adeptoj. Tial, al la esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne estas kun ni, ni diras: se la Internacia Lingvo, via Esperanto, povas esti por vi io pli ol romantika abstraktaĵo aŭ ol plezuro de ekumena kunveno, alprenu al vi la respondecon, doni al ĝi konkretecon; vi ne rajtas senigi vin je la tasko doni forton al la ununura partio, kiu strebas al tiu transnacia celo: membriĝu al la RP transnacia, por ke ni estu kune, se Esperanto (ankaŭ por vi, angle-parolantoj!) estu la "Internacia Lingvo" celanta "malfermi", kaj ne ĵargono celanta "eksterlasi".

SKOLTA AGADO EN ESPERANTO—PROFUNDE INTERNACIA SKOLTADO

de Anna Margareta Ritamäki

En oktobro 1993 pasis 75 jaroj de kiam Alexander William Thompson skribis libretan "Propono pri Skolta Esperantista Ligo". Tio estis la komenca paŝo por la kunligo de du grandaj idealaroj, la skolta kaj la Esperanta. Tio naskis la Skoltan Esperantistan Ligon, ekde 1972 nomatan Skolta Esperanto-Ligo. La unuaj jaroj estis sukcesaj kun internaciaj SEL-tendaroj, kaj pinte en 1933 partopreno en la Monda skolta ĵamboreo en Hungarujo kun granda grupo de Esperantoparolantaj skoltoj. Sed la kondiĉoj ne estis favoraj por SEL. La Monda skolta organizo praktike malpermesis la uzadon de Esperanto en 1934. "Ĉar Esperanto ne havas praktikan valoron" la organizo decidis "ne rekomendi" la lingvon al siaj membroorganizoj. Tiun rezolucion oni nuligis en 1964 kaj nuntempe la sinteno de la monda skolta oficejo certe ne estas malaproba, sed la kontaktoj estas malmultaj, ĉefe pro la malforto de Skolta Esperanto-Ligo.

Dum kelkaj jaroj estis granda krizo en


SEL. Gravaj funkciuloj kiuj dumlonge laboris devis eksiĝi. Estis problemoj trovi novajn fortojn. Tiukrizo estis jam plejparte venkita kiam mi komencis redakti la organon de la Ligo "La Skolta Mondo" fine de 1992, eĉ se daŭre ni serĉas novan ĝeneralan sekretariojn kaj pliajn novajn aktivulojn.

Okazas internaciaj SEL-tendaroj. Jam okazis plurnaciaj SEL-tendaroj SKOLTO '91, '92 kaj '93. Okazis ankaŭ aliaj SEL-aranĝoj en diversaj landoj. Kaj ŝajnas ke la evoluo ne stagnas. Ekzistas planoj ankaŭ por 1994. Kiel redaktoro estas ĝojige ricevi raportojn pri lokaj SEL-grupoj el la tuta mondo. Okazas kursoj laŭ la skolta lernolibro *Ĵamborea Lingvo*, kiu baldaŭ aperos en renovigita eldono. SEL planas aktive partopreni la grandajn skoltajn tendarojn en Nederlando 1994 kaj 1995, la Eŭropa kaj Monda ĵamboreoj.

Por mi, antaŭe tre aktiva skoltino, poste tre aktiva Esperantistino, la SEL-tendaroj estis mirindaj travivaĵoj. Esperanton ni ne

uzis nur ĝenerale por uzi Esperanton, por umi kune ĝenerale. Esperanton ni uzis pro nia komuna intereso, pro skolteco kaj niaj aktivecoj estis tradicie skoltaj. Esperanto estis por ni bongustiga spico, kiu donis profundan internacian etoson. Certe ne nur SEL, sed ankaŭ multaj aliaj fakaj organizoj povas atingi la samon. Esperanto atingas homojn kiuj ne interesiĝus nur pri la ĝenerala Esperantomovado ĉar Esperanto donas plian, internacian dimension al la jam kutima agado.

La Jubilean Numeron de *La Skolta Mondo* vi povas ricevi kontraŭ du internaciaj respondkuponoj, mondonaco (uea-konto: selx-m), aŭ eĉ senpage skribante al la redaktoro: AM Ritamäki, Peltolavägen 6 B 36, FI-20720 ÅBO, Finnlando, retadreso <aritamaki@finabo.abo.fi>. En ĝi aperas informoj pri la historio de SEL, sed ankaŭ pri la nuna agado. Membroj de SEL ricevas la gazeton kvarfoje jare. AM donos pliajn informojn ankaŭ pri SEL kaj la eblecoj membriĝi.



LETEROJ

[D-ro Giorgio Silfer estas Prezidanto de la Kooperativo de Literatura Foiro]

La alineo dediĉita de Humphrey Tonkin al raŭmismo (*esperanto usa*, 3/93) ne kongruas kun la, cetere alta, nivelo de lia ĉefparolado dum la 41a kongreso de ELNA, la 17an de julio 1993. Leginte ĝin, mi devas simple dedukti ke li miskomprenis raŭmismom.

Sufiĉas legi atente la tekston de la Manifesto de Raŭmo, 1980 (ĉu ĝi iam aperis en la ELNA-organo? mi persone ne memoras) kaj de postaj dokumentoj (ekz. la Konkludoj de Segedo, 1988) por rimarki ke nenie oni asertas "ke estas pli grave profundigi nin en la scio kaj utiligo kaj ĝuo de esperanto ol konvinki aliajn aliĝi".

Ankaŭ raŭmismo celas la disvastigon de nia lingvo: pri tio kolego Tonkin ne havu dubojn—li ne kalumniu la raŭmistojn egoismaj aŭ eĉ egotismaj. Sed eble Tonkin kaj la raŭmistoj ne disvastigas la saman lingvon: por li verŝajne taŭgas sloganoj kiel "la dua lingvo por ĉiuj" aŭ "la internacia helplingvo"—por ni, ne.

Laŭ la punkto 3 de la Manifesto de Raŭmo, ni sentas nin parto de "mem elektita diaspora lingva minoritato": ni vidas en Esperantio unikan parolkomunumon, kun propraj valoroj kaj vivostilo, prefere ol movadon por propagandi filantropiaĵon al la mondo. Ni deziras konstrui kaj progresigi ĉi tiun komunumon, nian lingvo minoritaton; kaj tion farante, ni ankaŭ disvastigas esperanton—ne kiel internacian helplingvon, sed kiel transnacion kulturlingvon.

Humphrey Tonkin evidente ne konscias pri la granda novaĵo de raŭmismo: ni asertis, ekde 1980, ke lingvoj estas ne nur rimedo por komunikado, sed ankaŭ (kaj precipe) por identiĝo.

Tiel longe kiel iuj bonvolaj UEA-anoj klopodis disvastigi esperanton laŭ finvenkismaj principoj, la Internacia PEN-Klubo fermis al ĝi sian pardonon; kiam la Esperanta PEN (fondita en novembro 1991) petis la aliĝon al PEN Internacia, kaj argumentis sian peton raŭmisme, tuj ĉela unua mondkongreso ĝi estis akceptita. Nia lingvo akiris pli da prestiĝo (kaj iom pli da uzantoj ĝi akiros).

Aliflanke, la radikoj de raŭmismo sinkas ĝis Zamenhof, kiu en 1901 05 28 skribis al Kofman: "Lingvo Internacia fortikiĝos por

ĉiam nur en tia okazo, se ekzistos ia grupo da homoj, kiu akceptus ĝin kiel sian lingvon familian, *heredan*. Cento da tiaj homoj estas por la ideo de lingvo neŭtralamultege pli grava ol milionoj da aliaj homoj. Hereda lingvo de la plej malgranda kaj plej sensignifa popolo havas vivon multege pli garantiitan kaj neestingeban, ol senpopola lingvo, kiun uzus eĉ milionoj da homoj".

Giorgi Silfer

[*Mi mem ne komprenas, kial ekzistas tiom da streĉiteco inter tradiciemuloj kaj raŭmismanoj—sed la streĉiteco ne estas nur unudirekta; ne Prof. d-ro Tonkin "kalumnias" pri "pracelanoj" en siaj informoj, aŭ uzas terminojn kiel "finvenkismaj principoj" pri UEA-anoj, por kiuj "fina venko" estas ankaŭ ŝerca esprimo. Sed laŭ mi estas sufiĉe da spaco—kaj ankaŭ sufiĉe da bezono—en la Esperanto-movado por ambaŭ skoloj.*

Iom responde al du argumentoj de d-ro Silfer. (1) Mi estas ano de UEA jam 34 jarojn, kaj ne memoras, ke ĝi iam ajn frapis ĉe la pordo de la Internacia PEN-Klubo, des malpli argumentis al ĝi "finvenkisme"; do la PEN-Klubo nepovis "fermi al ĝi sian pardonon". Kio tucerte ne subtrahas ion ajn de la grava sukceso de Esperanta PEN, akceptigi sin ĉe PEN-Klubo. (2) La menciita opinio de Zamenhof, pri la bezono de denaskaj parolantoj por garanti la estontecon de iu lingvo, ne multe trankviligos denaskajn parolantojn de la dalmata, manksa, kornvala, aŭ kelkdek aŭ kelkcent nordamerikaj lingvoj ankoraŭ uzataj en la epoko de Zamenhof—ĉar, malgraŭ centoj aŭ eĉ miloj da denaskaj parolantoj, tiuj lingvoj jam ne ekzistas. Kontraŭe al Z (pardonu la herezon!), mi opinias, ke la vivo de amata lingvo, eĉ sen hereda komunumo, estas multe pli bone garantiita ol tiu de iu ajn malgranda lingvo, kies ekzisto dependas entute de la historia sorto.]

[**La jena letero alvenis ĉe la ELNA Centra Oficejo en decembro. Mi iomete purigis la gramatikon kaj literumadon. Kiuj povos helpi, bonvolu helpi!**]

Mi estas knabo kun aĝo de 16 jaroj. Mia nomo estas M. M. Wickramasinghe. Mi havas du junajn fratojn kaj unu junan fratinton. Mia patro estis gazetaro-

fotografiisto. Mia patrino estis instruistino.

La teroristoj mortigis miajn gepatrojn en 1991. La teroristoj [bombis]* nian aŭtomobilon kun niaj gepatroj. Ili bruligis nian hejmon. Nun ni vivas kun niaj geavoj. Ili estas malriĉaj kaj tre maljunaj kaj malsanaj. Sed mi ne havas aliajn parencojn nun. Mia avo kaj mi kolektas brullignojn por domoj por aĉeti nian nutraĵon. Mi lernas kurson pri fotografio. Miaj instruistoj helpas min.

Miaj junaj gefratoj ne iras al lernejo ĉar ili ne havas edukado-materialojn. Mia avo ne havas monojn por aĉeti iliajn materialojn. Tial mi petas vian helpon. Mi dankas vin se vi sendos al ni kajerojn, plumojn, kraĵojn, tukojn kaj ŝuojn. Mi petas de vi vian helpon. Milionfoje dankas vin

M. M. Wickramasinghe
"Santhee"
Garden City
Diyatalawa
Sri Lanka

[*En tiu loko la juna verkinto enŝovis anglalingvan vorton "insulted," kiu por mi tute ne havas sencon en la koncerna kunteksto. La vorton "bombis" mi mem anstataŭis.]

Mi estas nova studento de Esperanto kaj la itala. Mi uzas simplan metodon kreskigi mian vort-provizon. Mi aĉetis pakon de malgrandaj "3-M Post-It Notes." Mi skribas la nomojn de objektoj, kiujn mi uzas ofte sur la notoj en Esperanto kaj la itala. Sur mia spegulo, mi metis noton ... "la spegulo ... lo specchio." Sur mia pordo, mi metis noton ... "la pordo ... il porto" (k.t.p.). Tiu metodo estas granda helpo kun mia studo de Esperanto kaj la itala. (Tiu metodo helpas mian familion lerni kelkajn vortojn, ankaŭ).

Robert Goos

Daŭrigata de paĝo 6

ricevi la semajnan informilon pri la Kampanjo, skribu al: "Esperanto" Radikala Partio, Via di Torre Argentina 76, I-00186 ROMA, Italio, fakso +39.6.68805396. Noto: Eblas legi *Translimen!* eĉ antaŭ ol ĝi estas presita, konektante sin al Agorà Telematika en la Sektoro "Noticoj Esperanto". Se vi havas retalirivon, simple tajpu **telnet agora.stm.it** aŭ **telnet 192.106.239.3** por atingi Agorà Telematika.

Daŭrigata de paĝo 2

will find an article by David Wolff on this subject elsewhere in this issue. This Fund is nowhere as ambitious as the Schulze Fund—its goal is \$2000—and the Achievement Awards are currently seen as a one-time experiment, though if they are successful in their goals (see the article) they may be continued in future years.

Simply put, the Achievement Awards were created to reward local Esperanto groups for successful activity on the local level. In the last few years we've had to recognize that, in many (or even most) ways, the local groups are more important to the success of Esperanto than ELNA. Yet local groups have a tendency to spring up, flourish for a time, and then disappear, leaving little behind them on which to build. We believe that ELNA has to give encouragement and support to local groups to help them continue growing; that is why ELNA now has a Commissioner for Local Groups (Don Coleman), why the Commissioner is now in the process of finalizing a handbook to help local groups, why a bulletin for local groups is now being developed, and why David Wolff proposed these Awards and is now working in the developing Commission for Local Groups.

If you, too, want to help contribute to the progress of local groups—perhaps one in your area!—please consider donating a sum to this Fund.

(3) The William W. Glenny Fund. This tiny, underused Fund was established several years ago by a donation from Bill Harmon in memory of Bill Glenny, a Los Angeles area Esperantist who worked for many years as the motor of the Esperanto Association of Los Angeles. The purpose of the fund is to put copies of David Richardson's *Esperanto • Learning and Using the International Language* into libraries around the country.

The Richardson book costs \$14.95 per copy. For sending books to libraries as donations, ELNA will absorb postal costs. If you decide to donate money to this fund, you should probably do so in multiples of \$14.95. Let me add that, if you send along with your donation a list of libraries to which you think books should be donated, and their addresses, your list will receive very favorable consideration.

Donations to all three of the above-mentioned Funds, as to any other ELNA Funds, are tax-deductible. I urge you to consider making a donation to one of them, or to some other Fund nearer your heart (again, a list is available from the C.O.) now.

The Commish

One of my stated goals in my campaign letter of last year was to name a new Commissioner for Women's Affairs.

The office of Commissioner for Women's Affairs was originally established some years ago at the request of San Diego Esperantist Eleanor Stein, who oc-

cupied the post for a number of years but resigned from it about two years ago. It has not been filled since. Based on what I have seen in ELNA, I felt that it needed to be filled. So I have appointed Becky Harris Commissioner for Women's Affairs.

Ms. Harris is a relatively recent Esperantist, but has already plunged deeply into the Esperanto world, including participation at San Francisco State University and in the 1993 Universala Kongreso. She is also knowledgeable about local cable access, and helps produce a show (not about Esperanto, though one of those may be in the works, too) on her local cable channel. She actively supports the idea of a "level playing field" for men and women in the Esperanto movement, and volunteered for the post, rather than waiting for me to come to her. Those with ideas about what ELNA may need to put or keep women on an equal basis with men in the organization should contact Ms. Harris; as with Board Members or other Commissioners, her address is in the membership list, which every member should have, or she can be reached through the Central Office.

There may be those who believe that I am not being genuinely "sexually egalitarian" by deciding to appoint a woman to this post rather than considering men as well. Rest assured that, should I decide that ELNA needs a Commissioner for Men's Affairs, I'll definitely appoint a man to that post. Then everything will be equal again.

Don Harlow

Daŭrigata de paĝo 1

alian "doton" de Aleksandro Zilbernik: lia renovigita domo en Kaunas la 11-an de decembro fariĝis Litova Esperanto-Centro.

Okazis io grava pri la Internacia Lingvo dum la jaro 1993—pluraj ekstermovadaj instancoj okupiĝis pri la lingva problemoj kaj implicate rekonis la rezultojn, kiujn la Esperanto-movado atingis tra la pasinta cento da jaroj: Umberto Eco per siaj doktoj kaj intelekta kuraĝo sukcesis skui la letargian silenton pri la komuna lingvo; en la ejoj de Eŭropa Parlamento oni simpoziiis pri planlingvoj; UNICEF establis konsultajn rilatojn kun UEA,

Internacia PEN-Klubo rekonis Esperanton kiel beletran lingvon kaj akceptis la membrecon de Esperanto-sekcio, Unesko denove rezoluciiis pri Esperanto.

Kvankam ofte povas ŝajni, ke nia laboro ne portas la esperatajn fruktojn, tio ne estas kialo por ĉesi labori. Ni ne povas scii, kiaj fine estos la rezultoj de nia strebado. Antaŭ kvin jaroj, kiu estus povinta imagi la nunan politikan situacion de la mondo? Kiu scias, kio estos post ankoraŭ kvin jaroj, post dek jaroj, post cent jaroj? Kiu scias, kia estos la lingva situacio en la mondo de la jaro 2094?

Ni laboru kaj esperu. Ni ĉerpu la inspiron el la ankoraŭ ĉiam plene aktuala

mondvizio de Zamenhof:

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,

Pri l'tempoj estontaj pensante.

Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas,—

Ni semas kaj semas konstante.

"Ho ĉesu!" mokante la homoj admonas,—

"Ne ĉesu, ne ĉesu!" en kor' al ni sonas:

"Obstine antaŭen! La nepoj vin benos, Se vi paciencie eltenos."

Kun bondeziroj por la jarŝanĝaj festotagoj kaj por la nova jaro 1994, salutas via

—John C. Wells

NOVAĴOJ

For your reading pleasure (and to inform those few ELNA members who haven't contacted us yet), here's the very latest news and information from USEJ—**ESPERANTO YOUTH GROUP**

FORMED IN NYC... Sasha Issenberg, a very enthusiastic young person from Larchmont NY, has just founded an Esperanto club at his high school, Horace Mann High School in Bronx NY. Sasha found it very insulting that his high school teaches eight languages, but not Esperanto. So he's talking with the school to see whether classes can be started. Congratulations and good luck, Sasha! Contact and support him at:

30 Cooper Lane

Larchmont NY 10538-1820.

NEW USEJ MEMBER IS POISONED...

but is eventually saved by a flying fish. If you think that's something, wait until you see what else is in store in issue no. 3 of *Ktp!*. If you haven't subscribed yet, make sure to contact USEJ today. (*Ktp!* is exchanged with several other local newsletters in the Northeast... is your group interested??)

WHEN WAS THE FIRST ESPERANTO PLAY PERFORMED??...

Which city in the world had the most individual UEA delegates in 1993? Which city has the most per million? These are just some of the interesting things readers of *Ktp!* will find out. If you know or have a fact or statistic about anything in the Esperanto movement, send them to us for publication. They can range from the simple ("When was ELNA founded?") to the truly trivial ("Which Esperantist has attended the most UKs?"). Include a source, if possible.

KICKOFF TIME...

is almost here for the World Cup! If games are happening in your area and you or your local group haven't already done so, write to USEJ to borrow its multilingual flyers about Esperanto and the movement. They're available in the major languages heard during the Cup, including English, German, French, Spanish, Portuguese, Russian, Bulgarian, Italian, and Dutch.

JUNULARAJ

Plus, they're well designed, thorough, and can be photocopied well. So don't miss this chance to grab the spectators about Esperanto—in their own language!

CALLING ALL CLUBS... USEJ is planning to produce a booklet or kit to help members for local clubs. If you've ever worked with a local club, whether it was a youth club or not, contact us for more info. The booklet will not only contain tips on how to form a local club, but also suggestions on how to keep it alive and active.

THE NORTHEAST (FINALLY!)... will have its own regional meeting. The original plan for a Canadian/American meeting has been scrapped, so it will be a regional congress instead. According to the present plans, it will take place during a mid-April weekend in a central Pennsylvania state park, easily accessible by car from everywhere in the Northeast US and maybe even Southern Canada (really). If you'd like to attend, or help plan, contact either USEJ or:

Anka Minor

101 Harrison Drive

New Cumberland PA 17070

FOR ALL THE NEW MEMBERS OF ELNA... welcome to the family! USEJ (Usona Esperantista Junularo) is the organization for the younger people of the Esperanto family. If you're under 27, contact us! (Even if you're not under 27, contact us anyway.) We offer many services (including a great newsletter, *Ktp!*). Plus, you can always rely on us for information and advice—a service which is, of course, priceless. Anyway, here's the address:

USEJ

624 Second Street

Lancaster PA 17603-5114

TEL: (717) 393-4273

FOR THE RETURNING MEMBERS OF ELNA... thanks for all of your support and ideas during the past year. Keep in touch during '94!

Josef Truong

Daŭrigata de paĝo 4

Powell-Market cable car turntable, he says he was approached several times by dope pushers offering "Smoke?", "Coke?" "Whatever you want," etc. Shaking them off, he walked to the Ellis St. corner and absentmindedly crossed against the red light—at which a cop in a cruiser shouted, "Hey, you, are you blind?" When Beatrice said he was sorry and tried to point out the nearby pushers, the officer added, "why don't you learn English?" and drove off. Piero is not in love with Ess Eff.

[Herb Caen in the *San Francisco, CA, Chronicle, August 26, 1993.*]

[*Togetherness.*]

But the real eye-opener comes from Japanese manufacturer Yamaha. While perusing the assembly instructions for his new Electric Grand keyboard, a reader found a diagram showing assorted pieces of hardware and labeled with a single Anglo-Saxon word of instruction. We can't repeat the instruction in this family magazine, but we believe the company meant 'screw'.

[*From Consumer Reports, August, 1993; sent by Barbara Colt.*]

[*Speaking in tongues.*]

Sustained sluggishness in U.S. markets combined with opportunities provided by the breakup of the Eastern Bloc, a unifying European market and at least the prospect of a North America Free Trade Agreement have pushed companies of all sizes to look for salvation outside the United States. And they are desperately seeking executives with multilingual and multicultural experience to help them compete.

Paul R. Ray & Co., an executive search firm based in Fort Worth, reports the number of searches in which clients request the job prospect display mastery of another language has doubled in the last year. The firm, which is expanding its searches into Latin America in light of NAFTA, says today's hot languages are Spanish and Russian. French, German and Japanese are also highly prized, as well as Korean and Chinese.

While English is the international language of business on a formal level, a company that conducts its business exclusively in English is prone to mistakes. Helga Long, president of the New York-

Daŭrigota sur paĝo 14

Daŭrigata de paĝo 13

based recruiting firm H.M. Long International Ltd., recounts her experience with a U.S. toy company eager to start manufacturing its products in Hong Kong. Speaking to his local managers in the only language he knew—English—the executive dictated his wishes, only to see them subverted.

The payoff from knowing another language can be big. During the 1982 Falklands war, Westinghouse was in danger of losing a contract to design an air traffic control system for the Venezuelan government, according to [Allied Signal, Inc., vice president Isaac] Barpal. The sore point was the American support for Britain in the war. But Barpal said Westinghouse marshaled a cadre of Spanish-speaking executives to rescue the deal.

[Excerpted from an article by Leah Beth Ward, *West County Times*, Sep. 12, 1993; provided by Angela Harlow.]

[Punch line]

Jimmy Carter got a standing ovation when he visited David Letterman's CBS late show Tuesday night to tout his new book, "Making Peace."

The former president got a few laughs when he told of giving a graduation speech near Osaka, Japan, that got big laughs for a little joke he told. Carter said he later learned that his Japanese translator didn't even bother to pass the joke on to the crowd. "President Carter just told a funny story and everyone must laugh," the translator told the crowd.

[From the *Tampa, FL, Tribune*, Sep. 30, 1993; provided by Ionel Onet.]

[An American tragedy ... again.]

The American dream ended violently for Yu Hai Liu, possibly because the recent [2-1/2 years] immigrant from China could not understand English, Oakland [CA] police said Thursday.

The 31-year-old Liu ... was fatally shot Wednesday night outside his West Oakland apartment by two men police believe were trying to rob him.

Sgt. Tom Swisher said the two men "said something to him in English which he didn't understand and then there was gunfire. Either they wanted his car or his valuables."

Swisher said it isn't known if the men shot Liu because they were angry that he didn't understand them or just impatient.

[Excerpted from an article by Harry

Harris, *Oakland, CA, Tribune*, Oct. 1, 1993; provided by Ionel Onet.]

[Getting with the program.]

Users of 1-2-3 for Windows 4.0 can simultaneously recalculate, calculate, maintain, neuberechnen and saikeisan their spreadsheets thanks to an unprecedented worldwide rollout last summer that saw Lotus Development Corp. release its upgrade in 23 languages.

The impetus for U.S. vendors to translate their software is increased revenue. For the past few years, companies such as Microsoft Corp., IBM, WordPerfect Corp. and Borland International, Inc. have seen the overseas market provide more than 50% of their total revenue, company officials said.

"More than half of our revenue for OS/2 is from outside the U.S.," said Wally Casey, director of marketing at IBM's Personal System Products division in White Plains, N.Y. "I can't afford to be more than a couple days [behind the English release] with foreign-language versions."

[Excerpted from an article by Cara A. Cunningham, *Computerworld*, Oct. 4, 1993; provided by George Partlow.]

[“Failure Spoken Here.”]

Aristeo Zambrano's 11-year-old daughter is "pretty smart," her father says, but she still can't read and write at her grade level, in either English or Spanish, although she's been in bilingual education classes in the Oakland public schools for five years. His older daughter entered middle school speaking little English, but received no English instruction—or even a bilingual aide to help out.

"When a bilingual kid is thrown into a regular class," [Zambrano] says, "he's not going to make it. By high school he's so behind and so frustrated he's going to walk out."

Throughout California, students not fluent in English—a large and increasing percentage—face similar problems.

Has the movement to reform education improved things for these students?

So far, not very much, according to a major study to be issued next month by the San Francisco think tank California Tomorrow. Researcher Laurie Olsen studied 80 California public schools engaged in major reform efforts. In only 15 of these did she find non-English-speaking students fully included and benefiting from the reforms.

In most schools they are neglected,

Olsen says, because most teachers are monolingual English speakers with little understanding of the students' cultures or of the process of learning a second language. "No matter how committed and loving they are, how many volunteer hours they put in," she says, "they end up making decisions that are blind to the needs of the very kids they're trying to serve."

For example, in some schools, teachers' enthusiasm for including all children leads them to abolish the separate bilingual education classes desperately needed by students with limited English skills.

[Excerpted from an article "Failure spoken here" in the *San Francisco, CA, Bay Guardian*, Oct. 6, 1993.]

[Nursing one's gripes.]

Frank Hall, Nito Ceralbo, Fe Calabiao and Ethwelda Tarrosa say they were fired from the Casa San Miguel convalescent home in Concord for speaking Tagalog in bathrooms and linen closets.

Jordania Reed said she was fired for speaking Spanish to co-workers in the hallway at Driftwood Convalescent Hospital in Gilroy.

All say they occasionally spoke in their native tongues to each other, but not to patients. But all were written up for allegedly violating "English-only" rules in the workplace.

What happened was that these employees got caught in one of the most misunderstood—and according to civil rights groups, most abused—gray areas of the law. There are no laws prohibiting speaking a foreign language on the job; but neither are there laws saying employers who fire people for doing it are committing an illegal act.

[Equal Employment Opportunity Commission staff attorney John] Peck said some employers were "overreacting" to the provision in Title 7 of the Civil Rights Act that said a requirement to speak English only on the job may be imposed because of business necessity. "There are situations an employer can justify by showing a compelling business necessity but they over-reacted because the guidelines regarding patient dignity were not clear.

"We've had situations where employees were barred from speaking foreign languages in the lunchroom because the patients would occasionally use it."

[From an article by Joyce Routson in the *West County Times*, Oct. 7, 1993; provided by Angela Harlow.]



VOLAS KORESPONDI

Amikeco trans limoj

Noto: Nomojn kaj adresojn ni prezentas dikliteraj; familiaj kaj urbaj nomoj estas MAJUSKLAJ. Komojn ni uzas por montri ŝanĝon inter linioj en adreso.

BRAZILIO

Pekim VAZ, Caixa Postal 182, BELÉM—PA, 66017 970. Volas interŝanĝi librojn, gazetojn, kasedojn kaj poŝtmarkojn.

KENJO

Deogratias CIMA, Zairean Community Kakuma, Group 61, Box 43801 U.N.H.C.R., NAIROBI. Zairia rifuĝinto loĝanta en Kenjo, kun aliaj zairiaj esperantistoj.

RUMANIO

Cristina SADEANU, str. Democratiei nr. 1640, Com. Rasinari, RO-2439 Jud. SIBIU. 13-jara lernantino, ŝatas muzikon, sporton, literaturon, dancon, historion, geografion ktp.

Laura MARIN, str. Urlea 52, RO-2400 SIBIU. 15-jara lernantino, ŝatas muzikon, sporton, literaturon, historion kaj fremdajn lingvojn.

Ionut STOIA, Str. Salciilor nr. 16, RO-2400 SIBIU. 15-jara lernanto.

Ioana STOIA, Str. Salciilor nr. 16, RO-2400 SIBIU. 16-jara lernantino.

Mirela SADEANU, str. Democratiei nr. 1640, Com. Rasinari, RO-2439 Jud. SIBIU. 18-jara lernantino, ŝatas muzikon, sporton, literaturon, dancon, historion, geografion ktp.

MAN Isabela, Str. Tiplisului Bl. H2.Sc. B Et. II Ap. 5, RO-1700 RESITA. 20-jara studentino.

TOMOZEI Daniela, Str. Rahovei nr. 43 Sc. I Et. III Ap. 12, RO-2400 SIBIU. 20-jara studentino.

RUSU Carmen, Str. 9 Mai nr. 77 Sc. A Ap. 3, RO-2400 SIBIU. 21-jara studentino.

BUCUTA Mihaela, Str. Cugir nr. 7, RO-2400 SIBIU. 23-jara studentino en kibernetika psiko-pedagogio.

DIMA Doru, Str. Neptun nr. 8 Sc. C Ap. 11, RO-2200 BRASOV. 23-jara studento en kibernetika psiko-pedagogio.

FLOREA Bogdan, Str. Rahova nr. 14 Bl. 12 Ap. 13, RO-2400 SIBIU. 23-jara studento en kibernetika psiko-pedagogio.

MARCU Patricia, Str. Teilor nr. 30, RO-2400 SIBIU. 23-jara studentino en kibernetika psiko-pedagogio.

MUNTEAN Mirela, Str. Deva nr. 47, RO-2400 SIBIU. 23-jara studentino en kibernetika psiko-pedagogio.

RAULEA Ciprian, Str. Vasile Alecsandri nr. 15, RO-2400 SIBIU. 23-jara studento en kibernetika psiko-pedagogio.

SIRBU Ioan, Str. Calea Dumbravii Bl. 16 Sc. D Ap. 54, RO-2400 SIBIU. 23-jara studento.

STANA Nicoleta, Str. Donath nr. 117 Bl. Q1 Ap. 12, RO-3400 CLUJ-NAPOCA. 23-jara studento en kibernetika psiko-pedagogio.

Nicoleta CIMPOERIU, Str. Ludos nr. 12 Bl. 28 Sc. A Et. I Ap. 2, RO-2400 SIBIU. 28-jara kadrastra teknikistino.

Sara REISENAUER, Str. Livezii nr. 29, RO-2400 SIBIU. 34-jara universitata lektorino.

Daniela DORDEA, Str. Rusciorului Bl. 24 Ap. 6, RO-2400 SIBIU. 37-jara inĝenierino.

Ioan LUPU, Str. Eroilor nr. 15, RO-2400 SIBIU. 42-jara instruisto.

Anca SIRGHIE, Str. Dr. Stinca nr. 17, RO-2400 SIBIU. 45-jara instruistino.

Doina POPA, Str. L. Rebreanu nr. 6, RO-2400 SIBIU. 48-jara oficistino.

Elena LANT, Str. Hegel nr. 8, RO-2400 SIBIU. 55-jara emerita fervojoficistino.

Bucura VASILESCU, Str. Rahova Bl. 35 Ap. 31, RO-2400 SIBIU. 56-jara oficistino.

Gheorghe DUMITRU, Str. Dr. Kornhauser nr. 24, RO-2400 SIBIU. 57-jara universitata profesoro.

Nicolae RODEAN, Str. Mitropoliei nr. 18, RO-2400 SIBIU. 58-jara pupteartartisto.

Ory MOCANU, Str. A Muresanu nr. 35, RO-2400 SIBIU. 64-jara emerita oficistino.

Elena POPA, Str. Eroilor nr. 11, RO-2400 SIBIU. 64-jara emerita

oficistino.

Elena GHERMAN, Str. L. Rebreanu nr. 6, RO-2400 SIBIU. 66-jara muzikinstruistino.

Ana-Maria GAVRILA, Str. Eroilor nr. 13, RO-2400 SIBIU. 67-jara emerita oficistino.

RUSIO

ZVEZDINOV Jurij, Vinogradnaja 6, RU-357807 NEZLOBNAJA, Georgievskij r-on, Stavropolskij kraj. 18-jara viro, pri ĉiuj temoj.

Irinia KUZMINA, RU-183053 MURMANSK, ul. Krupskoj 20 kv. 28. 21-jara masaĝistino, interesiĝas pri kosmetologio, psikologio, fremdaj lingvoj.

Viktorija PISKOVNINA, RU-183039 MURMANSK, ul. Knipoviĉa 39 kv. 69. 24-jara bibliotekistino, interesiĝas pri ĵazo, legado de psikologia literaturo, vojaĝoj, Scipovas ankaŭ la anglan.

JARINOVA Larisa, RU-183045 MURMANSK, prosp. Kolskij 47 kv. 51. 30-jara oficistino, pri ĉiuj temoj.

Nadejda SITNIKOVA, RU-183039 MURMANSK, ul. Knipoviĉa 49/2 kv. 23. 30-jara zooteknikistino, havas 6-jaran filon kaj 10-jaran filinon, interesiĝas pri animaloj, trikado, legado.

Larisa GARUSOVA, RU-183031 MURMANSK, ul. Radiŝĉeva 11 kv. 13. 33-jara juristino, fraŭlino, interesiĝas pri filozofio, religioj, dommastrumo.

Olga SIROTKINA, RU-183045 MURMANSK, ul. Kosmodemjanskoj 15/1 kv. 15. 36-jara edzino, havas 13-jaran filon, ŝatas triki, kuiru, pri ĉiuj temoj.

TANZANIO

S-ro Karlo SHENGO Kavimba, Kigwa Refugee Settlement, P.O. Box 1727, TABORA. 20-jara zairia rifuĝinto, komencanto (tamen treege fluskriba), libroservisto de la Maendeleo Esperanto-Klubo (konsistas el rifuĝintoj el pluraj landoj).



! 25th Year !

San Francisco State University

June 27-July 15
three-week multilevel courses.

The best in the world.

With guided sightseeing in San Francisco and vicinity and group transfer to the ELNA convention in Sacramento.

University of Hartford

Esperanto workshops July 11-16
Sightseeing in New York and Boston with arrival July 8

Dr. Humphrey Tonkin, Director.

ELNA Convention July 15-18

Sacramento CA kun plena programo de prelegoj, distraĵoj kaj ekskursoj en Sacramento inkluzive la belan kapitolon kaj la plej bona trajn-muzeo en la mondo.



President: Donald J. Harlow (1996), P.O. Box 551, Pinole, CA 94564, tel. (510) 222-0187
Vice President: Sherry A. Wells (1996)
Secretary: Ellen Eddy (1995)
Treasurer: John B. Massey (1994)
Other Board Members: William R. Harmon (1994), William H. Schulze (1994), Mark C. Stephens (1994), Thomas Eccardt (1995), D. Gary Grady (1995), Rochelle Grossman (1995), Doroteo Holland (1996), David Richardson (1996), Derek Roff (1996)

Commissioners and Chairs: Don Coleman (Local Clubs, Nominating), John Dale (Legislative Affairs), Jim Deer (Tape Service), David Gaines (Youth), Angela Harlow (Congresses), Lucy Harmon (Travel Affairs, Audio-Visual Instruction), Becky Harris (Women's Affairs), Dorothy Holland (Correspondence Courses), R. Kent Jones (Education), Dr. Julius Manson (United Nations), John B. Massey (Wills and Gifting), John B. Massey, William H. Schulze and Sidney V. Steinberg (Kapitala Fondusa Komitato), John Mathews (Service Clubs), Catherine Schulze (Postal Course), Sherry Wells (Publicity), David Wolff (Publishing)

Director, Central Office: Miko Sloper

VOJAĜOJ VOKAS VIN

Antaŭkongreso de 79a UK

(Neoficiala) 15-22 julio - inkluzivas ELNA kongreson kaj ekskurson tra vitejaj valoj al San Francisco por flugo al Seulo por la UK.

79a Univ. Kongreso de Esperanto

23-30 julio 1994 - Seŭlo, Koreio

Korea is a hidden treasure, little known to most Americans. It proved to be a delight to us when we revisited it in October of 1993 - after twenty years. Seoul has grown into an attractive, cosmopolitan city with lush landscapes among beautiful mountains. And full of enthusiastic, active Esperantists!

The booming economy has resulted in luxurious, expensive hotels; but EVS has contracted with a good, well-situated hotel at reasonable prices - less than \$50 per night (shared basis). The Korean cultural programs, national monuments and museums are wonderful. The Korean culture is not just a take-off of the Chinese or Japanese, but distinctive in its own right, as is the Korean race; and has the added plus of a unique and very charming sense of humor.

VENU KUN NI AL KOREIO!

Internacia Junulara Kongreso

30 jul-6 aŭg., Chonan, Koreio

Post-UK ekskurso July 30-August 4

Korea is an unusually beautiful country with numerous national parks, well-preserved temples and castles and a long, beautiful coastline. Don't miss the opportunity to see this delightful, underappreciated country!

Post-Post Ekskurso 4-13 August Vietnamio, Perlo de la Oriento

Throughout its history, Vietnam has been heavily influenced by foreign countries. From its early Chinese origins, through French rule, to Japanese occupation, and finally the Vietnam War ending in 1975, we find a country with a fascinating blend of ancient and modern sights, western and oriental ideas. With over 2,000 KM of coast line and mountains rising to over 3,000 meters, the scenery is as diverse as its people and its history. We will tour the length of this Southeast Asian country from Ho Chi Minh City (formerly Saigon) through Da Nang and Hue to Hanoi and beautiful Halong Bay.

The U.S. Government no longer restricts U.S. citizens from traveling to Vietnam, and our Esperantist "samideanoj" are anxious to welcome us. (See the enclosed brochure.)

Esperanto Vojaĝ-Servo

6104 La Salle Avenue

Oakland CA 94611

[510] 339-2001

FAX [510] 339-6317

USE YOUR ESPERANTO TRAVEL SERVICE FOR ALL YOUR TRAVEL NEEDS!

Vice-Director, Central Office: Ionel Onet
ELNA Archivist: Ionel Onet
Any member wishing to assist in the work of any of the above named commissions or committees should communicate with the member(s) shown.

ELNA Dues for 1994

Regular	\$30
Family	\$45
Youth (under 27)	\$15
Limited income	\$15
Sustaining	\$60
Life	\$600

ELNA is a non-profit organization functioning under IRS paragraph 501(c)3. Donations are tax-deductible.

A separate supporting category, "Friend of Esperanto," has been established. A Friend of Esperanto pays \$10 per year.

Libraries and other institutions can subscribe to *Esperanto U.S.A.* at the special rate of \$15 per year.

UEA dues 1994

Member-Guidebook only (MG)	\$ 9.00
Member-Yearbook only (MJ)	\$22.00
Member-Subscriber (MA)	\$54.00
Societo Zamenhof (additional)	\$108.00
Subscription only to Esperanto	\$32.00
Subscription only to Kontakto	\$18.00

Life Membership in UEA \$1350.00
Send payments for UEA memberships or subscriptions to ELNA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Make all checks payable to ELNA.

MOVING? DON'T LEAVE ESPERANTO BEHIND! If you have moved recently or are planning to move in the near future, don't forget to send a change-of-address card to the ELNA Central Office, Box 1129, El Cerrito CA 94530. This will assure your continued receipt of the Newsletter and other information. If you don't have a stamp handy, give the CO a call at (510) 653-0998. Thanks!

DEADLINE FOR MATERIAL FOR ISSUE 1994(2) of Esperanto U.S.A. is Mar. 25, 1994

Esperanto U.S.A.
Volume 29, No. 5
ISSN 1056-0297
Esperanto League for North America, Inc.
P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530
Telephone: (510) 653-0998
For Info: (800) 828-5944
Fax: (510) 653-1468
Internet: elna@netcom.com
Editor: Don Harlow
Telephone: (510) 222-0187
Internet: donh@netcom.com